

ILEI raportas

Raportas la Prezidanto kaj la Estraro pri trimonata agado, de 2016-04-15 ĝis 2016-07-15.

Eventoj

La Prezidanto preparis 142-paĝan **Prelegaron** pri la Tria Tutmonda Kolokvo (TTK) pri instruado de Esperanto, kiu okazis en Svislando (Neuŝatelo kaj La Chaux-de-Fonds) la 13-an ĝis la 16-a de majo 2015. La verko aperos en la paĝaro de ILEI. Papera eldono iros al la ĉefaj bibliotekoj de nia movado (en Roterdamo, Vieno kaj La Chaux-de-Fonds). La Estraro ellaboris proponojn por la buĝeto 2017 rilate al tiuj eldonoj.

La entrepreno Weidgon Film produktis sub la reĝisorado de Nelida Weidmann, profesia filmistino, 35-minutan filmon, kiu montras resumon de la Kolokvo. La filmo en formato PAL HD iros al la 3 ĉefaj bibliotekoj same kiel la **Prelegaro**, kaj al Herzberg, la oficiala arkivejo de ILEI. Ĝi estos aĉetebla okaze de UK kaj de ILEI-Konferenco. Prezo EUR 10.

Aperis alia Prelegaro, tiu de la **Tago de la Lernado** en Lille en 2015. Tiun eventon prizorgis Marija Belosevic, Kroatio. Ŝi same efike zorgis pri redaktado de la Prelegaro. Aperis papere 7 ekzempleroj por la ĉefaj bibliotekoj kaj arkivejo de ILEI. La verko aperos en la paĝaro de ILEI.

Nederlanda instanco enketis detale pri ILEI kaj ties gvidantoj. La prezidanto kaj la kasisto zorgis pri plenumado de la postuloj de la nederlanda kontrola instanco, kiu ricevis detalan prezenton de la Ligo, de ĝia strukturo, de 3 gvidantoj kaj de la financa situacio de la Ligo por kontroli, de kie venas la enspezoj de ILEI (lukto kontraŭ monlavado). Tiaj esploroj estas kutimo por internacie agantaj institucioj kiel ILEI estas.

Okazis **voĉdonado** en la Komitato de ILEI por decidi, kiu dum pliaj 3 jaroj deĵoros nome de ILEI en la **Komitato de UEA**. Estis unuanime reelektita la Prezidanto Mireille Grosjean.

La prezidantino de la **Flandra Komisiono** pri Instruado Kathleen Helsen (Belgio) interesiĝas pri la pedagogia valoro de Esperanto. La Prezidanto Mireille Grosjean pridiskutis tiun aferon kun koncernaj personoj el la belga sekcio kaj proponis eblan strategion por solvi la problemon pri manko de kvalitaj instruistoj de E-o.

Komenciĝis finfine laboro pri ordigo de **ILEI-arkivo** en Massa, kiuj estas definitive en la manoj de la itala Ŝtato. La Prezidanto diligente kontaktadis dum lastaj monatoj kun la italaj samideanoj el tiu urbo kaj ricevis sukcesan respondon pri komenco de la esplora kaj listiga laboro. Do, estis atingita konfirmo de masaĵoj pri plenumado de tiu ordigo dum laŭeble unu jaro. Kaj estis konsentite, ke laborontoj informos regule la Estraron pri enhavo de tiuj arkivoj.

Danke al Ranieri Clerici (Italio) estis levita demando pri "flipped classroom", inversa klasoĉambro aŭ **malferma lernado**. Pri tio prelegis Radojica Petrovic en nia Konferenco en Oostende, 2015. Denove pridiskutota temo, precipe dum la konferenco-2016 en Hungario, kiu havas la temon "NOVAJ VOJOJ DE LERNADO".

Kapabligo. ILEI subtenos 5 personojn por la unujara **Instruista Trejnado en UAM** en Poznan, Polando. Nun la Prezidanto redaktas la demandaron por elekti la kandidatojn kaj preparolas kun la Estraro de UEA pri diskonigo de la informo ankaŭ tra la kanaloj de UEA.

Jaro de la LERNANTO

Maje-junie la Estraro dense okupiĝis pri la enhavo kaj praktika realigado de la Jaro de la LERNANTO (JdL).

Okazis vasta ideokolektado pri JdL (la prezenton eblas vidi ĉe google-drive <https://docs.google.com/document/d/13RDqrMv8IB2Nfr26TiUnrQlcNDccGPPj51tnYLwv5VA/edit?usp=sharing>, kie la Prezidanto kreis koncernan dokumenton). Dum sia **fizika estrarkunsido** maje en Les Brenets (Svislando) la Estraro kune kun la estrarano de UEA Stefan MacGill detale pridiskutis kaj kompletigis la enhavon de la JdL kaj komencis formi laborgrupon por realigo de JdL.

Junie estis ellaborita programo por JdL kun detala tempoplano kaj taskaro por ĉiu fadeno de la programo. Post interparolo kun ĉiu proponita persono estis finkreita laborgrupo por realigo de JdL konsistante el Grosjean Mireille, MacGill Stefan, Nadikova Elena, Nguyen Nepo (TEJO Vjetnamio), Pirlot Germain (Belgio).

Nun la Estraro redaktas kaj kompletigas la programon de JdL kune kun UEA por prezenti ĝin dum UK kaj ILEI-konferenco. Estas pritaktata kun la Estraro de UEA ankaŭ plano okazigi eventojn de JdL kadre de diversaj eventoj tra la Jaro, inter aliaj kadre de ISOA, ILEI Seminario en Orienta Azio, inkluzive pere de AMO-seminario.

La **eldonado** de kajeroj kun Prelegaro de la Tago de la Lernado kaj la ILEI-Konferenco, same kiel reeldono de la okpaĝa varbilo dulingva devas esti buĝetitaj.

Vivo de la Ligo

La 49-a Konferenco de ILEI en Nyíregyháza, Hungario.

Daŭras la laboro pri la programo de la konferenco. La estrarano pri konferencoj Radojica Petrovic rapide kaj diligente precizigas la programon. Kaj nun li aktive preparas la Konferencan Libron (KL), kiu aperos julie. La Prezidanto kaj Radojica Petrovic ellaboris regularon por la konkurso por subvencii partoprenontojn el B-landoj por ebligi partoprenon en la ĉi-jara ILEI-Konferenco en Hungario.

La prezidanto verkis mallongan tekston pri ILEI-konferenco por la junia numero de la Revuo Esperanto (RE).

Venontaj Konferencoj

La Konferenco en la venonta jaro okupis multe da atento kaj tempo dum la maja fizika kunsido de la Estraro kaj postaj skajpaj kunsidoj.

Maje estis pridiskutita kaj decidita la temo por la sekva ILEI-Konferenco. La Estraro proponis ligi la temon kun la deklarita de UNESKO "Jaro de turismo 2017". La temo estos: *Edukado al respekt plena turismo*. Plie la elektita temo spegulas edukajn celojn de ILEI. La Estraro pridiskutis kaj ellaboris kelkajn planojn por la konferencoj 2017 kaj 2018 rilate al loko. La estrarano pri konferencoj Radojica Petrovic senĉese kontaktiĝis kun koncernaj personoj pri okazigo de konferenco kaj finfine estis determinita definitiva loko por la venontjara konferenco, kondiĉe ke ĉiuj informoj pri loĝado kaj prezoj alvenos al ILEI kaj kongruos kun la kutimoj.

Nun Petrovic preparas prezenton de la 50-a ILEI-Konferenco 2017 por Nyíregyháza 2016. Ĝi estos prezentita ankaŭ dum UK en Nitra julie.

Fine de junio la Prezidanto kaj Petrovic preparis la definitivan oficialan prezentleteron pri ILEI por la Konferenco 2017 kaj sendis ĝin al la koncernaj ŝtataj instancoj. Ĝi estas dulingva: esperanta kaj angla (pere de traduko de Ronald Glossop). Estis konsentite, ke la konferenca urbo sendos fotojn por

aperigo en la Konferenca Libro – 2016. Nun Radojica preparas ĉiun alian bezonatan informon pri la konferenco-2017 por aperigi ĝin en Hungario ĉi-aŭguste.

Komisionoj, sekcioj, reprezentantoj kaj kontaktpresonoj

En Tanzanio, Barato kaj Armenio okazas preparlaboroj por krei sekcion.

La vicprezidanto Xiao-Feng GONG “Arko” kun la ĉina sekcio de ILEI aktive preparas ISOA-n – ILEI Seminarion en Orienta Azio (2-6 nov), kiu koncernas geinstruistojn el Ĉinio, Koreio kaj Japanio; ĝin partoprenos ankaŭ la Prezidanto.

Evidentiĝas nesolvebla loko la problemo pri ILEI-sekcio en Ukrainio. La Estraro kaj la Prezidanto persone ricevis kelkajn raportojn, petojn kaj plendojn de niaj samideanoj el tiu lando. Maje la Estraro de ILEI ricevis ankaŭ inviton por partopreni kunvenon en Ljucko, okcidente de Ukrainio. Tamen la Estraro, esplorinte la situacion pri eblaj vojaĝoj, decidis ne sendi siajn reprezentantojn al la lando kaj siavice ricevis anojn de ambaŭ flankoj kiel partoprenontojn de la 49-a Konferenco de ILEI en Hungario; tio ebligis pridiskuti la situacion.

La anoncita konkurso por apogi partoprenon de 30 personoj en la Konferenco allogas aliĝantojn; la Estraro decidis ĝin dum sia kunsido en Les Brenets ĉi-maje laŭ sugesto de ILEI-membro Rob Moerbeek, Nederlando.

Venis ankaŭ raportoj pri diversaj eventoj el la sekcioj pri Esperanto-eventoj.

Estraro

Post longa paŭzo reaperis regulaj kunsidoj de la Estraro.

Unua – tre produktiva kaj sukcesa – okazis fizike en Les Brenets, Svislando, la 5-an ĝis 8-a de majo kun partopreno de ĉiuj 7 estraranoj (3 fizike kaj 4 per skajpo) kaj observanto de UEA Stefan MacGill. Estis ellaborita kaj plenumita abunda tagordo el 12 blokoj pri ĉiuj agaddirektoj de ILEI. Estis difinitaj kaj metitaj strategiaj direktoj en diversaj kampoj de la ILEI-agado; organiziĝis laborkapabla kohera estrara teamo; estis ellaboritaj gravaj decidoj en ĉiuj agadkampoj de ILEI. Poste estis organizitaj 2 plenaj skajpaj kunsidoj (26-an de majo; 25-an de junio) kaj unu plia kun parto de la estraro.

Nun la Estraro pridiskutas la tagordon por sia dua fizika kunsido tuj post la Konferenco en Nyíregyháza dum du tagoj kaj duono.

Internacia Pedagogia Revuo (IPR)

Fine de aprilo aperis IPR 2016/1. Jam malfruas IPR 2016/2. La redaktoro Jozefo Németh finpreparis la retajn variantojn de IPR 2016/2.

Dum sia maja kunsido la Estraro decidis venigi materialojn pri la kvar plej fortaj kaj grandaj sekcioj de ILEI en IPR kadre de JdL: Ĉinio en IPR 2016/3; Germanio en IPR 2016/4; Francio en IPR 2017/1 kaj Hungario en IPR 2017/2. Junie la Prezidanto trasendis alvokojn al la sekciestroj kaj komitatanoj de tiuj sekcioj. La estraro planas po 3-4 paĝoj pri ĉiuj 4 sekcioj.

ILEI enketas pri la financa aspekto de IPR kaj JA. La Prezidanto preparis detalan demandaron cele al esplorado pri financa stato de IPR kaj JA.

Juna Amiko (JA)

Dum sia maja kunsido la Estraro decidis eldoni specialan jubilean 150-an numeron de JA – 2017/1.

La Koleg-helpa Kaso

Ĝi utilas al membrigo de instruistoj en nepagipovaj landoj. La estraro decidis lanĉi alvokon por mondonacoj en KhK-n.

ILEI en la Reto

La Prezidanto regule kaj senlace plenigas Facebook-paĝon «[ILEI labortable - ILEI desktop](#)» per diversaj aktualaj informoj pri la vivo de la Ligo, novaĵoj, komentoj, fotoj, reklamo pri ILEI kaj instruado de Esperanto ĝenerale.

Antaŭ 10 jaroj, en majo de 2006, fondiĝis la interreta Internacia Laborgrupo por Antaŭenigi la Lernejan Instruadon de Esperanto. La Estraro gratulis la laborgrupon kaj proponis informfluan inter ĝi kaj ILEI.

Kunlaboro kun UEA

La Estraro de ILEI komencis realigi gravajn komunajn kun UEA projektojn: unue – ellaboris strategian programon por JdL, due – pridiskutis kune novan esploron pri E-centroj tra la mondo.

Estis planita AMO- LIMA seminario en Les Brenets, Svislando, en majo 2017.

La vicprezidanto de UEA Stefan MacGill kaj la vicprezidanto de ILEI Xiao-Feng GONG “Arko” interkonsentis konigi ISOA-n tra la mondo pere de EKO-anoncoj (Estraro Komunikas).

La Estraro pridiskutis la planitan internacian sciencan Esperanto-rumanan kolokvon ESPERANTO - PONTO INTER LINGVOJ KAJ KULTUROJ novembre 2016, en Timișoara, Rumanio.

Dum UK

ILEI planas vaste prezenti sin kaj sian agadon dum UK en Nitra. Por la *Tago de la Lernado*, okaze de UK, la Estraro proponis la temon *DE GVIDANTO AL KONSILANTO*. La Prezidanto substrekas la efikan laboron de Marija Belosevic, Kroatio, kiu preparas la prelegaron por tiu Tago. Ankaŭ estraranoj aliĝis al la internacia lingva konferenco “Perspektivoj de lingva komunikado en Eŭropa Unio”, kiu okazos samtempe kun UK en Nitra. Tie estos vasta kampo por prezenti E-agadon ĝenerale kaj E-instruadon por ekstera publiko.

Kun TEJO La Prezidanto estos en Benino fine de septembro kaj en oktobro kaj planas kunlaboron kun la benina TEJO-sekcio por kurso difinota.

La prezidanto estas en daŭra kunlaboro kun www.edukado.net kaj ĝia gvidanto Katalin Kovats.

La prezidanto sendis 5 **salutmesaĝojn** nome de ILEI dum tiuj 3 monatoj.

Kontakto kun ekstermovadaj institucioj

La Prezidanto diligente sekvas la agadon de **UNESKO** por enigi agadon de ILEI en tiu mondskala direkto. Ĝis nun venis neniu respondo al la kandidatiĝo de ILEI por fariĝi NRO agnoskita de UNESKO.

La Prezidanto rilatas kun la aŭtoroj de la ret-kurso **Duolingo**.

ILEI alvokas partopreni filmkonkurson de **Ĉina Radio Internacia** (Esperanto fako)
<http://esperanto.cri.cn/teokajamo2016e/#>

Farendaĵoj

Organizi statutmodifojn.

Krei esplorprogramon por listigado de E-centroj.

Krei taskarojn por ĉiu laborkomisiono de ILEI.

Dankoj

Ĉiuj personoj, kiuj iom iel kontribuas al la mastrumado kaj vivo de la Ligo ricevu elkorajn dankojn.

Sekretario de ILEI:

Elena Nadikova

Prezidanto de ILEI:

Mireille Grosjean

2016-07-15